

ESPERANTO

EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

Nro. 7

DECEMBRO, 1948

Ses Pencoĵ

Por Komencantoj

LA
WAVERLEY
ESPERANTA
LERNOLIBRO

Unua Parto

Kartone bindita, 2ŝ 9p afrankite

Tole bindita, 4ŝ 6p afrankite

DUNDEE PRINTERS LIMITED

14 Victoria Road, Dundee

Phone 4806

LA
WAVERLEY
ESPERANTA
LERNOLIBRO

Dua Parto

La dua parto enhavas, plene kaj detale, pluajn klarigojn pri la gramatikaj punktoj. La legaĵo, kiun oni havigis de spertaj Esperantistoj el diversaj partoj de la mondo, estas interesa. En la fino de ĉiu leciono troviĝas sekcio por hejmsudado.

La tuta kurso celas, antaŭ ĉio, ebligi al la lernanto flue paroli la lingvon.

Kartone bindita, 28 9p afrankite

DUNDEE PRINTERS LIMITED

14 Victoria Road, Dundee

Phone 4806

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

Redaktoro: William Clarke, 9 Howard Crescent, Dunfermline

Nro. 7

Decembro, 1948

Ses Pencoĵ

AL NIAJ LEGANTOJ

Kun bondeziroj, la Federacio deziras
al ĉiu sukceson en la nova jaro.

LA VIRO KIU PRIZORGIS ĈION

Unuakta Komedio — de E. N. Taylor

ROLULOJ:

Irene	Junulino
Ernest	Junulo
Phyllis	Junulino

(La scenejo estas la litĉambro de Irene en angla domo kampara. En la malantaŭo de la scenejo estas utiligebla fenestro, iomete malferma, kaj malmoderna tir-sonorilo. La lito estas pretigita, kaj ujo por varma akvo staras sur aŭ apud la lavejo; vestoj sterniĝas sur plej multaj el la seĝoj. Malgranda valizo kuŝas malferma sur kanapo apud la lito. Irene estas vidata, staranta profile ĉe la vestejo; ŝi estas vestita per posttagmeza robo. Ŝi elektas robon kaj tre zorgeme faldas ĝin. Ŝi ne sukcesas enpaki ĝin en la valizon, kaj post du provoj ŝi elskuas ĝin kaj elektas ankoraŭ unu. Kiam ĝi estas duonfaldita ŝi lasas ĝin fali kaj denove ekprenas la unuan. Horloĝo — for de la scenejo — sonas la dekduan horon. Irene iras al la vestejo kaj staras dorse al la fenestro. De ekstere oni malrapide malfermas la fenestron. Eniras Ernest, tra la fenestro. Li portas malpuran pluv-superveston kaj grizan kompletan, kol-kravatton kaj tre malpurajn ledajn gantojn. Pecoj de hedero kaj ampelopso alkroĉiĝas al li, kaj nigra makulo estas sur lia vizaĝo. Lia sinteno estas tre memfida kaj tiel daŭras dum la tuta tempo. Irene sin turnas kaj, dum Ernest antaŭenpaŝas kun etenditaj brakoj, ŝi ekparolas.)

Irene: Vi venis, do.

Ernest: Jes. (Ili alproksimiĝas unu al la alia kaj versaĵne ekkisos, sed ŝi retiras sin.)

Irene: Via vizaĝo! (Ernest iras al la spegulo.)

Ernest: Ho! mi pensis pri tio. (Ernest deprenas la gantojn kaj metas ilin en la poŝon. El alia poŝo li prenas malgrandajn spongon kaj tualet-tukon, malsekigas la spongon en kruĉo, purigas la vizaĝon kaj remetas la spongon kaj tukon en la poŝon. Poste li demetas la pluvveston kaj kravaton, malkaŝante ŝnur-ŝtuparon ligitan ĉirkaŭ la talio. Li ĝin malvolvas kaj ĝin alkroĉas pere de ĝiaj hokoj al la fenestro, kaj la ŝtupar-restaĵo falas ekster la fenestro, for de la scenejo. Li forigis heder-pecetojn de sur siaj vestoj, viŝas la ŝuojn per la kravato kaj turnas sin al Irene, kiu jam sidiĝis sur la liton.)

Irene: Vi pensas pri ĉio, ĉu ne, Ernest?

Ernest: Mi provizis kontraŭ ĉia ajn okazo.

Irene: Oni povas pensi, ke vi havis antaŭan sperton.

Ernest: Tiel estas; mi tralegis ĉiujn konatajn aŭtoritojn.

Irene: En la rakontoj, kutime la kaleŝo rompiĝas.

Ernest: Aŭtomobiloj estas pli fidindaj.

Irene: Kie estas la aŭtomobilo?

Ernest: Guste trans la parketo — kaŝita al la domo per la rododendroj.

Irene: Mi ne aŭdis ĝin, sed eble iu alia ĝin aŭdis.

Ernest: Mi opinias, ke ne. Mi veturigis ĝin malsupren de la deklivo, ne-ekfunkciante la motoron.

Irene: Eble ĝi ne ekfunkcios.

Ernest: Mi mem esploradis la tutan motoron hodiaŭ post-tagmeze.

Irene: Eĉ Rolls povas malfunkcii.

Ernest: Mi antaŭzorgis tian eventualon. Ford aŭtomobilo sekvos.

Irene: La ŝoforo eble perfidos nin.

Ernest: Dumviva amiko, kiun mi tutkore fidas, veturigos la aŭtomobilon.

Irene: Kaj kien ni iros?

Ernest: Londonon.

Irene: Jes, mi scias; sed kien en Londono.

Ernest: Al Simpson.

Irene: Mi ne konas Simpson.

Ernest: Estonta plezuro.

Irene: Kio estas lia specialaĵo?

Ernest: Matenmanĝo.

Irene: Ne estu azeno, Ernest. Mi volas sciigi, ĉu vi efektive prizorgis ĉion. Kiaj estas viaj planoj?

Ernest: Unue, matenmanĝo; poste, la edziĝo; kaj pli poste aeroplano al Parizo.

Irene: Edziĝa matenmanĝo ordinare okazas post la ceremonio.

Ernest: Ne en amforkuroj — sed ĉiaokaze ni havos bonegan lunĉon en la aeroplano.

Irene: Kie okazos la edziĝa ceremonio?

Ernest: Ĉe St Martins-in-the-Fields, ĝuste kontraŭ "Airways Oficejo."

Irene: Ĉu vi estas certa, ke okazos nenia malfacilaĵo.

Ernest: Nenia ajn. Mi mem iris al Canterbury kaj havigis la apartan edziĝpermeson. La pastro estas bonegulo, kiu estis kun mi ĉe Cambridge. Vi certe memoras lin, Irene; alta brunhara viro — nomo Hopkins. Vi dancis multe kun li.

Irene: Jes, ŝajnas ke mi memoras lin. Mi opinias, ke ni povas fidi je li.

Ernest: Kompreneble! Li neniam en sia vivo perfidis iun ajn.

Irene: Ĉu ni ne bezonas alian, krom la pastro?

Ernest: Mi aranĝis por du atestantoj, kaj aldone ni havos la ŝoforon.

Irene: Mi ne estas certa, ke plaĉus al mi aeroplani.

Ernest: Sed jen la ĉefa ideo. En la pasinteco la kaŭzo de malsukceso estis, ke kiam venis la horo oni diris, "Nun ni devas flugi," sed oni ne povis. Hodiaŭ oni efektive povas flugi, kaj sukceso estas certa.

Irene: Vi estas certa, ke ni povos flugi?

Ernest: Mi havas la biletojn en mia poŝto.

Irene: Kaj la pasportojn?

Ernest: Kaj la pasportojn.

Irene: Ĉiaokaze mi ne estas preta.

Ernest: Mi pensis pri tio. (Ernest iras al unu flanko de la scenejo, sidiĝas kaj ekbruligas la pipon, tute senĝene. Irene rekomencas la enpakadon, sed, ŝi estas eĉ pli sendecida ol antaŭe. Post kelkaj minutoj ŝi alproksimiĝas al Ernest.)

Irene: Ernest, vi estas tre zorgema persono, sed ĉu vi estas certa, ke mi povas fidi al vi?

Ernest: Tute certa.

Irene: Lastatempe mi dubis.

Ernest: Sed kial? Ĉu mi ne plenumis vian plej etan deziron?

Irene: Via konduto ŝanĝiĝis.

Ernest: Ĝi ŝanĝiĝis je via peto.

Irene: Kion vi volas diri?

Ernest: Tio estis via ideo, ke, por eviti ian suspekton, mi ŝajnu malpli amanta.

Irene: Jes, mia kara Ernest, sed oni povas esti tro ruza, Estas facile, ŝajniĝi perdon de la amo, sed mi dubas ĉu ĝuste tiel facile oni povas ĝin regajni aliloke.

Ernest: Mi ne tute komprenas — kion signifas “ aliloke ”?

Irene: Mi tre bedaŭras, ke mi iam invitis Phyllis veni viziti min.

Ernest: Sed vi mem sugestis, ke mi ŝajnigu ameton al Phyllis.

Irene: Viaj etaj komplezoj al Phyllis baldaŭ fariĝis tro konvinkaj. Vi kaj Phyllis estis nedisigeblaj. Vi rigardis min, kvazaŭ mi ne estis tie. Vi malatentis pri mi kaj lasis min sola dum horoj kaj iris ĉiam kun Phyllis.

Ernest: Mi ne rimarkis, ke vi estas ofte sola. Ĉiutage vi golf-ludis kun George Drummond.

Irene: Nu. Kial ne? Mi devis fari ion—krome, vi konsentis, ke evitus suspekton se mi iaforte akompanus alian personon. Vi ne rajtas esti ĵaluza kontraŭ George.

Ernest: Mi ne estas eĉ ĵaluzeta kontraŭ George. (Kolerete Irene iras al la tualet-tablo kaj pudras la nazon. Sengene Ernest daŭrigas la fumadon. Sekvas paŭzo. Irene alproksimiĝas al la valizo—poste ŝi revenas kaj tre intence metas cigaredon en ingon, ekbruligas, kaj venas apud Ernest.)

Irene: Vi do estas preta por ĝin fari?

Ernest: Tute preta.

Irene: Ĉu ankoraŭ restas tempo por iri Londonon?

Ernest: Sufiĉe da tempo.

Irene: Kaj vi opinias, ke vi elfaros ĝin sen ia malhelpaĵo?

Ernest: Troviĝos nenia malhelpaĵo.

Irene: Vi efektive estas mirinda, Ernest, sed ĉu vi estas certa, ke viaj aranĝoj estas kompletaj?

Ernest: Ili estas kompletaj je ĉiu detalo.

Irene: Ne, vi eraras, Ernest. Vi opinias, ke vi estas viro kiu prizorgis ĉion, sed troviĝas eta detalo, kiun vi ne antaŭvidis.

Ernest: Sed mi ankoraŭ povas priatenti ĝin.

Irene: Mi timas, ke ne. Vi tiel entuziasmiĝis pri viaj planoj, ke vi forgesis la plej gravan detalon. Amforkuro bezonas du personojn, mia bona Ernest, kaj mi rifuzas akompani vin!

Ernest (tre trankvile): Mi pensis pri tio.

Irene: KIO?

(Eniras Phyllis. Ŝi estas vestita per eleganta aŭtomobilkompleto kaj portas malgrandan valizon kaj malpezan pluvombrelon.)

Phyllis: Halo', Ernest.

Ernest: Halo', karulino. (Entuziasme Ernest kaj Phyllis ĉirkaŭprenas unu la alian. Irene malantaŭen stumblas kaj sidiĝas sur la lito senspira pro ŝoko.)

Phyllis: Ĉu ĉio estas preta? (Ŝi iras al la spegulo, ordigas la ĉapelon kaj harojn, kaj pudras la nazon.)

Ernest: Ĉio. (Rapide li ŝlosas la pordon, lasas fali la ŝlosilon en la kruĉon, kaj disrompas la tirsonorilon.)

Phyllis: Mi ne aŭdis la aŭtomobilon.

Ernest: Ĝi alvenis sen ia bruo.

Irene (sin regante): Kaj kion, vi opinias, vi faros nun?

Phyllis: Mi amforkuros, mia kara. Por kio, vi opinias, Ernest kunportis la ŝtupetaron? (Ŝi iras kaj ekzamenas la ŝtupetaron.) Ĉu ĝi estas sendanĝera, karulo?

Ernest: Mi tenos ĝin ĝis vi malsupreniros. (Li helpas al ŝi surmeti pluvmantelon kaj eliri tra la fenestro. Ŝi ekiras malsupren laŭ la ŝtupetaro.)

Irene: Nu! Mi almenaŭ deziras scii, kial vi ne eliras per via propra fenestro, Phyllis.

Ernest: Troviĝas neniu hedero tie. (De tempo al tempo aŭdiĝas knareto dum Phyllis malsupreniras — for de la scenejo. Ernest rapide surmetas la pluv-superveston, eltiras ŝnuron el la poŝo kaj mallevas la mansaketon de Phyllis. Irene vane tiras la tirsonorilon, poste transkuras al la pordo.)

Irene: Mi alvokos la patron. (Vokas) Patro!

Ernest: Mi konsilas, ne faru tion. Li demandos nur, kial vi lasis min eniri vian ĉambron. (Ernest iras tra la fenestro kaj komencas malsupreniri.)

Irene: Nu, estas io, kion vi forgesis, vi malfidinda besto! (Ŝi ŝetegas lian kravaton tra la fenestro.) Nun, ĉar mi estas libera je vi kaj viaj planaĉoj, mi opinias, ke mi forkuros kun George Drummond.

Ernest: Mi pensis ankaŭ pri tio. George atendas vin en la dua aŭtomobilo.

Noto: La supra teatraĵeto eble estos utila por prezentado al lokaj Esperantistaj Grupoj.

PICTS KAJ SCOTS

La du vortoj "Picts" kaj "Scots" memorigas al oni pri la epoko, en kiu tiuj antikvaj homrasoj unue enloĝiĝis en la Britaj Insuloj. En la tiama lingvo la litero "p" ofte anstataŭis la literon "f," kaj eĉ "ct" fariĝis "xt" aŭ "ght." Do ja povas esti, ke la vorto "Pict" originale signifis homon kiu estis "fixt," aŭ, alivorte, tiu, kiu havis "fiksitan" loĝlokon en aparta distrikto aŭ regiono en Britujo.

En tiu sama epoko enloĝis en Britujo la homraso "Scots." Kontraŭe al la "Picts," la "Scots" apartenis al raso "elpuŝita" en la sud-orientan parton de la insulo Britujo, kaj de tiam estis konata, kiel "Scots." La vorto "Scot" devenas de la saksa verbo "scitan," kun la signifo "pafi" aŭ "elpuŝi" (angle, "shoot" aŭ "expel"), kaj la ago farita estas nomita "shot" aŭ "push." Do, "Scot" originale estis "elpuŝita" homo.

Similan signifon oni povas konstati ĉe la angla vorto "shout," kiu efektive estas "elpuŝita" sono. Ankoraŭ troviĝas en al angla lingvo vortoj el la sama fonto: ekzemple, la vorto "shot-free," kiu oni pliofte prononcas "scot-free," kun la signifo "sen ia pago" aŭ "sen ia puno." Glitanto estas, angle, "skater," kaj signifas iun, kiu "elpuŝas" la piedojn. Ĉevalo kiu simile agadas estas "skittish" (NE Scottish).

En iuj distriktoj ankoraŭ estas uzata la vorto "shot," kun la signifo "monsumo pagota" de foriranta gasto kontraŭ restado en hotelo. Inter niaj leg-esprimoj ankoraŭ troviĝas "scot and lot."

La "Picts" prefere konstruis urbojn apud la elfluejoj de la riveroj. Ili farmis la teron kaj sin okupis pri fiŝkaptado. Aliflanke la "Scots" gajnis la vivrimedojn per ĉasado, precipe, en regionoj monthavaj.

J. B.

LA DANKEMA ERINACETO

Oni ne kutimas malsovaĝigi la erinacojn, ĉar ili ne estas facile kareseblaj; tamen ili povas esti tiel fidelaj, kiel niaj dombestoj.

Iun tagon knabo alportis al mi erinaceton (aĝan proksimume du monatojn). Ĝiaj haregoj ankoraŭ ne estis tute malmolaj, kaj oni povis preni la malgrandan bulon en la manon kaj ne suferi pukvundojn. Sufiĉe rapide ĝi montris sian kapeton kaj rigardis nin.

Ni donis al ĝi helikojn, lakton kaj iomete da porkaĵo (tio okazis antaŭ la milito). Ĝi avide manĝis kaj trinkis, kaj fine ni metis ĝin en nian grandan ĝardenon. Ĝi fortrotetis kaj malaperis en la verdaĵon, sed ĉiuvespere, tuj post la sunsubiro, ĝi alkuris al nia pordo kaj atendis sian lakton kaj siajn frandaĵojn. Niaj katoj bonvolis akcepti tiun kamaradon, sed kompreneble ne ludis kun ĝi.

Kelkaj semajnoj forpasis. La progreso estis sentebla: eĉ kiam noktiĝis oni povis voki la besteton kaj ĝi venis, trapasante la korton.

Malfeliĉe, iun vesperon dum ni estis en la ĝardeno, ni vidis dikan erinaceton, kiu forte batis nian besteton. Ni forpelis la malbonan beston. Ĉi tiu tamen revenis, kaj pli ol unufoje nia erinaceto estis vundita nokte. Oni povis nek flegi nek protekti ĝin, kaj tial ni decidis redoni al Riketo liberecon, por ke ĝi povu senpene elekti kaŝejon. Mi do portis la besteton en arbaron, proksimume du kilometrojn for. Mi estis iom malĝoja, kaj, antaŭ ol forlasi ĝin, mi tondis kelkajn haregojn de ĝia kapeto: kaj "Adiaŭ, mi ne plu revidos vin!"

Tiun vesperon nia korto ŝajnis dezerta, sen la familia besteto.

La morgaŭan tagon, tagmeze, oni sonorigas. Mi malfermas la pordon. Sinjoro diras al mi, "Mi petas pardonon, sed rigardu, jen estas erinaco, kiu volas eniri ĉe vi." Mia besteto estas tie! . . . en angluo sur la tria ŝtupo, kaj ĝi atendas!

Se la marko ne estus sur ĝia kapo, mi ne estus kredinta miajn okulojn. Mi miregis. Tiel malgranda estulo marŝis almenaŭ du kilometrojn, kaj dum la plena lumo, por retrovi nin!

Kompreneble ĝi estis festita. Poste ni portis ĝian malamikon en alian ĝardenon, kaj Riketo rekomencis siajn agrablajn vizitojn ĉiuvespere.

J. NOUAIS.

Malgranda knabino portis infanon en la brakoj. Preterpasanto: "Tio estas peza ŝarĝo por vi." La knabino: "Ĝi ne estas ŝarĝo; ĝi estas mia frateto."

IOM PSIKA

Sajnis al mi, ke li estas malbonhumorulo: li havis liphararon similan al tiu de rosmaro, kio montris, ke li havas nenian bonhumoron—kaj mi jam gardis trenveturilon, malantaŭveturilon, du porkojn kaj vilaĝan idioton. Mi tamen prenis lin en la malantaŭveturilon—li almenaŭ estos pli bona kunulo, ol la idioto.

Kiam li estis komforte sidigita inter la porkoj, li elprenis el unu poŝo poŝhorloĝon, kaj el alia ŝraŭbturnilon, kaj komencis puŝegi la internon de la poŝhorloĝo. “Tiu ĉi estas tre bona ilo” li diris, donante al ĝi speciale fortan tordon, “Oni nun ne povas doni al siaj poŝhorloĝoj la korektan traktadon.” Subite aŭdiĝis krako kaj flugzuma bruo el la poŝhorloĝo. Li aspektis surprizita, kaj repuŝegis la horloĝon en la poŝon. “Mi hav . . .” li komencis, kaj ĉesis. Mi rigardis lin: lia vizaĝo aspektis strange verde-blanka. “Nu, super la flanko,” mi diris, miskomprenante la signojn. “Mi ne estas malsana,” diris li, kunvenigante siajn pensojn. “Ĝi estas antaŭaverto; mi kelkfoje ricevas ilin. Mi memoras ke, kiam Onklino Agneso mortis, mi . . .” “Kio estas okazonta?” mi timiĝante interrompis. “Mi ne scias. Ĝi estos io neagraba — mi certas, ke ĝi estos io tre malagraba—sed pri kio ĝi estas, mi havas nenian ideon.”

La idioto, influite per la sento de kondamno en la aero, sidigis sur la porkoj kaj ploris. La ceteron de la vojaĝo mi veturis, akompanate de la ploreganta idioto kaj de la multaj “AVERTOJ” de la alia vojaĝanto. Fine, tamen, ni alvenis al la fino de la vojaĝo. La viro eliris kaj dankis al mi—per tio, kion oni povus nomi “afableco” — kaj malaperis en butikon.

Post minuto li revenis. “Nenio okazis,” li diris per tre malĝoja voĉtono. “Ho ve!” Io eble okazos, tamen.” Li foriris, kelkfoje rigardante min de trans sia ŝultro. Mi rigardis lin, ĝis li malaperis, kaj mi rekomencis mian vojaĝon.

Kaj ĝuste kiam la humoro de la afero alvenis al mi, la gvidilo rompiĝis sub miaj manoj.

H. C. M.

Antaŭ ĉio, lingvo rilatas a la orelo kaj el la lango, kaj ne sole al libroj kaj al la animo. Pratikado estas la ĉefa afero, kaj oni povas atingi facilecon nur per konstanta legado kaj konstanta parolado.—Prof John Stuart Blackie.

* * *

Pri stilo havu ion dirindan, kaj diru ĝin kiel eble plej klare. Tio estas la sola sekreto pri stilo.—Matthew Arnold.

Vizito al Delegito de U.E.A.

La tago estis varmega kiam mi vizitis la hejmon de S-ro T. C. Hawley, Delegito de U.E.A., en Pretoria. Ges-roj Hawley loĝas en belega, ripoziga hejmo proksimume dek mejlojn for de Pretoria. La domo estas ĉirkaŭita de bone aranĝita ĝardeno, en kiu kreskas multaj plantoj kaj arboj.

Je alveno S-ino Hawley regalis min per teo kaj Sud-Afrikaj frandaĵoj, kaj poste ni iris en la ĝardenon por vidi la specialan kolekton da sukoplenaj plantoj kaj belaj florantaj arboj subtropikaj. Do, tre rapide forflugis la antaŭtagmezo ĝis lunĉo.

Ne malproksime troviĝis la dresejo por la Sud-Afrikaj policaj hundoj, kaj precipe por vidi ĉi tiujn hundojn mi estis veninta al Quagga-poort. Tie ĉi la hundoj kiuj fariĝos detektivoj estas dresitaj kaj senditaj al diversaj partoj de Sud- kaj Nord-Afriko, ankaŭ al Rhodesia kaj Palestino. La tipo de hundo plej ofte uzata estas parte "Dobermann" kaj parte "Rottweiler," sed nun oni provas ankaŭ "Rhodesian Ridgebacks." La dresado komenciĝas kiam la hundoj havas ĉirkaŭ kvar monatojn.

Sur la paradplaco, kie troviĝis diversaj bariloj, mi rigardis kun granda intereso kaj plezuro du spertajn hundojn montrantaj sian lertecon. Ili supersaltis barilojn altajn kvar futojn. Ili rampis tra tuboj, suprengrimis ŝtuparon kaj promenis laŭlonge de mallarĝa muro kun perfekta ekvilibro.

La obeado estas absoluta, ne gravas kie la hundo estas: je ordono ĝi kuŝiĝas, stariĝas aŭ bojas. Rampante sur la stomako, ĝi povus sekvi suspektiton nevidata de li.

Unu el la hundoj foriris kun la ŝnuro trenata, kaj alia hundo estis sendita por revenigi ĝin. Ĝi tuj kuris, kaptis la ŝnuron per la buŝo kaj rekondukis la vageman hundon al la mastro.

La plej mirinda faro, tamen, estis la eltrovo de suspektito. "Krimulo" estis elekita el nombro da indiĝenoj, kiuj sidis laŭvice sur la kampo. Tiu venis kaj per la kalkano frotis sur la vojo, kaj poste residiĝis. La hundo nun estas alkondukita al la piedsigno, kiun ĝi flaras. Je la ordono trovi tiun, kiu faris la piedsignon, ĝi iras, kun la nazo sur la tero, al ĉiu el la enlandanoj, ĝis ĝi estas certa, kiu estas la "krimulo." Tiam ĝi saltas sur la ŝultrojn de la "krimulo" kaj bojas, ĝis la mastro revokas ĝin. Dum la tuta ekzerco la hundestro staras donante la ordonojn sen ia gesto, kaj neniam estas necese ripeti ordonon.

La hundoj komprenas nur "Afrikaans," kaj kiam hundo estas sendita en alian landon, la mastro devas lerni la "Afrikaans"

ordonojn. Tiuj hundoj multe helpas al la policianoj, speciale en la kampara regiono.

En ĉi tiu bela loko mi pasigis tutan tagon. S-ro Hawley renkontis min ĉe la stacidomo, per aŭto venigis min al sia hejmo, kie lia edzino kaj familio bonvenigis min, kaj vespere audiaŭis min en la stacio, kiam mi ekiris al Johannesburg je la fino de perfekta tago, dank' al Esperanto kaj al la gastama familio de Kapitano Hawley.

A. G. M.

LA RUGA VIRINO

Dum mallonga tempo mi laboris en nia trinkejo, kiu estas en Bridgeton, Glasgovo. Tie mi vidis kaj aŭskultis multajn mirindajn aferojn. Unu matenon estis necese, ke mi deĵoru en la butikoj, por ke laboristoj povu fari riparojn. Kiam ili foriris estis nur la naŭa horo, tro frue por labori, tro malfrue por iri hejmen kaj poste reveni al la butikoj. Do mi staris ekster la pordo, pensante. Subite knabino alparolis min, demandante, kial mi tie staras tiel frue en la mateno. Kiam mi klarigis la aferon, ŝi invitis min eniri ŝian domon por matenmanĝi. Mi ne volis, sed ju pli mi rifuzis des pli ŝi insistis, ĝis fine, ne dezirante ofendi ŝin, mi konsentis. Si kaj ŝia fratino estis bonaj klientoj ĉe nia butikoj, sed mi ne bone konis ilin. Tamen, mi eniris la domon.

Kiam mi eniris ilian kuirejon, mi estis surprizita. Interne estis bele; bona meblaro kun belaj ornamaĵoj. Silkaj kurtenoj kovris la fenestrojn. Sed la plej granda surprizo estis la matenmanĝo. Mi ricevis lardon kun ovoĵoj kaj bongustan kafon. Mi rimarkis, ke sur la tablo estis tasoj por ses personoj. Vidinte mian surprizon kaj intereson, la fratino diris, ke ili havas gastojn. Guste tiam, tri maristoj eniris la kuirejon—du Norvegoj kaj unu Usonano. Mi miris, sed ne havis tempon aŭ inklinon pripensi, kaj baldaŭ mi foriris.

Je mia foriro mi aŭdis la virojn ridantaj. Mi malsupreniris la ŝtuparon, kaj kiam mi atingis la enirejon, tie staris la "Black Maria." Mi transiris la straton, kaj dum mi malfermis la butikon, mi vidis miajn kvin kunulojn enirantaj la "Black Maria."

Kiam mi renkontis mian fraton tiun vesperon kaj sciigis al li pri mia matena aventuro, li ridis ĝis li ploris. Li diris, ke tiu domo, en kiu mi matenmanĝis, estas unu el la plej malbonfamaj domoj en la urbo, kaj li mokeme aldonis, "Por vi la salajro de peko estis lardo kaj du ovoĵoj." La sciigis al mia edzo la aferon, sed mia edzo ne tiel multe ridis. De tiu tempo mia familio ofte nomas min "La Ruga Virino."

C. GIRVAN.

La 44a Skota Kongreso

La 44a Kongreso okazos en Edinburgo, en monato Aprilo. Detaloj ankoraŭ ne estas pretaj, sed plenan informon kaj aliĝilon oni baldaŭ ricevos de la Kongresa Sekretariino.

La Movado en Germanujo

Ĉiu el ni scias, ke la unua postmilita Germana Esperanto-Kongreso brile sukcesis. Oni jam aranĝas pri la dua postmilita Kongreso, kiu okazos en Gottingen dum Pentekosto, 1949 (de la 4a ĝis la 9a de junio). Estos aranĝita modela Esperanto-ekspozicio, kiu eble iĝos daŭra institucio en Germanujo, kaj rilate la kolektadon de materialo la helpo de samideanoj estas bezonata. La Germana Esperanto-Asocio do petis, ke ni publiku jenan anoncon:

“ Por ekspozicio dum la Germana Esperanto-Kongreso, 1949, ni petas ĉiujn samideanojn sendi al ni ĉiaspecan materialon. Via helpo gravas por ni. Sendu al Heini Kohne, (20), Gottingen, Egelsberg 14, Germanio.”

Ni esperas, ke ĉiu, kiu povas iel helpi, sendos materialon al S-ro Kohne.

Grup-Raportoj

Aberdeen.—Fino E. E. Duthie gvidas Esperantan kurson kun naŭ lernantoj. La kurso estas sub la aŭspicio de la Eduka Aŭtoritato kaj okazas en la vespera lernejo.

* * *

Dunfermline.—Kurso ĉe 12 High Street. Ok lernantoj aliĝis: Tri, ŝajne, jam rezignis pri la afero, sed kvin regule ĉeestas kaj faras bonan progreson.

* * *

Kirkcaldy.—La Grupo en Kirkcaldy daŭrigas sian agadon laŭeble. Neoficiala klaso funkcias ĉiun jaŭdon en Kirkcaldy Technical School kun kvar komencantoj. En la hejmo de Ges-roj Fraser kvin geknaboj, ĉirkaŭ naŭjaraj, renkontigas ĉiun lundvesperon por lerni—kaj ludi—Esperante. Iu ĵurnalisto, aŭdinte pri ĉi tiu neordinara klaso, venis neanoncite, pri-demandis kaj fotografis la klaseton kaj aperigis la fotografon kun priskriba paragrafo en la vastekonatan “Daily Record.” Bona propagando!

Je la fino de Novembro la ensenditaj subskriboj por la Petskribo sumis 437.

DISTRU VIN

Irlandano maltrafis vagonaron. Amiko lia kriis al li, "Pat, vi ne kuris sufiĉe rapide." "Ho, jes, mi ja tion faris," estis la respondo, "sed mi ne ekiris sufiĉe frue."

* * *

Iu anglo kaj iu skoto interdisputis pri tio, ĉu en Anglujo aŭ en Skotlando naskiĝis la plej eminentaj homoj. La skoto pretendis, ke ĉiu nomo menciita apartenis al homo naskiĝinta norde de rivero Tweed, ĝis fine la anglo diris, "Vi ne povas pretendi, ke Shakespeare estis skoto." "Ne," respondis la skoto, "mi ne povas diri, ke Shakespeare estis skota, tamen vi devas konfesi, ke li estis preskaŭ sufiĉe klera por esti tia."

* * *

Maljuna farmisto kaj lia edzino staris antaŭ sia porkstalo, rigardante sian solan porkon. La maljunulino diris, "Nu, Johano, morgaŭ estos la datreveno de nia edziĝo; ni buĉu la porkon." Respondis Johano: "Kial buĉu la kompatindan porkon pro tio, kio okazis antaŭ dudek kvin jaroj?"

* * *

Senmona vagabond-vagulo ne sukcesis ricevi ian drinkaĵon dum pli ol semajno. Li eniris drinkejon nomitan "George and the Dragon," klarigis al la mastrino sian bezonon kaj mankon de mono. La mastrino kolerege ordonis al li foriri. Li pensis al si, revenis kaj petis. "Ĉu estas permesate, vidi George?" —El "Stories frae Aberdeen."

* * *

En iu restoracio troviĝis afiŝo — "Fumi Malpermesate." Kamparano sidis kaj fumadis. La restoracio-estro atentigis al la afiŝo.

"Ĉu oni devas obei al ĉiuj el tiuj afiŝoj?" demandis la kamparano.

"Kial do, laŭ via opinio, ili estas tie?" respondis la estro.

"Nu, mi nur volas scii," rediris la kamparano, "pri tiu alia — 'Vestu Vin per Venus Korseto.'" —El "Stories frae Aberdeen."

* * *

Iu maljunulino vizitis apotekon kun recepto pri kuracilo por sia nepo. Vidante la apotekiston pesi la kuracilon laŭ skrupula ekzakteco, kaj ne sciante, ke li faras tion ne pro avareco sed por ke li ne donu danĝeran superdozon, ŝi diris al li: "Sinjoro, sinjoro, ne tiel avaru: tio estas por kompatinda, senpatra infano."

Genio signifas paciencon, diris iam la instruistoj de retoriko. Multe pli ĝuste estus diri; Genio signifas sindetenemon.—Stojan Miĥajlovski.

* * *

La genia verkisto ne estas magiisto, kiu ŝanĝas je oro ĉion, kion li prenas; li estas lertulo, kiu prenas nur tion, kio povas ŝanĝi je oro
Li ne kreas, sed rekreas: jen la diferenco!—Stojan Miĥajlovski.

DO YOU BUY
PRINTING

on the same principle that you purchase the other needs of life? Do you think of quality, of appropriateness, and of appeal? The **DUNDEE PRINTERS LIMITED** supplies printing that meets all those characteristic points, and it aims at giving service to all who require printing with character and discrimination. We also furnish Estimates.

Ask for Mr Harry Macgregor

Dundee Printers Limited

Complete Printing Service

14 VICTORIA ROAD DUNDEE

Telephone No. 4806

ESPERANTO EN SKOTLANDO

6 pence per copy. 2/- for four issues.

DUNDEE PRINTERS LIMITED, 14 VICTORIA ROAD, DUNDEE

